# Esperanto - La Bitbulteno 100


esperanto.es

## PRONTO COMIENZA EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN SORIA

Ya se aproxima el comienzo del 83º Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar este año 2025 entre el 1 y el 4 de mayo en la ciudad de Soria. El evento acogerá a más de 150 esperantistas de todas las regiones españolas y numerosos países europeos. La mayor parte de actividades tendrán lugar en el Espacio Cultural Santa Clara, que el Ayuntamiento de Soria ha puesto a disposición del evento.

Durante el Congreso tendrá lugar una amplia variedad de actividades, incluyendo conferencias, presentaciones de libros, un festival de vídeos, conciertos musicales, todo en la lengua internacional esperanto. Además, habrá reuniones y sesiones de trabajo sobre la propia comunidad esperantista, así como otras actividades lúdicas y turísticas.

Puedes conocer más detalles en esta página web, https://kongreso.esperanto.es, que incluye el programa, asistentes, datos prácticos y otra información, además del boletín de inscripción.





## PROGRAMA ABIERTO DEL CONGRESO DE ESPERANTO EN SORIA

Conforme a los objetivos de colaboración de la Federación Española de Esperanto, muchas de las actividades del Congreso Español de Esperanto estarán abiertas al público soriano en general. Ello incluye una exposición sobre el esperanto que se puede visitar en el Espacio Santa Clara desde el día 21 de abril, un par de charlas introductoras al idioma, que tendrán lugar el 29 y 30 de abril en el Círculo Amistad Numancia, o un curso de iniciación al esperanto. También los conciertos de música, a cargo del músico tulusano JoMo y el grupo catalán Kaj Tiel Plu, serán de acceso libre.

Es de destacar además la celebración de una velada en homenaje a la poeta soriana María Ángeles Maeso, parte de cuya obra está traducida al esperanto. El acto será bilingüe, en español y esperanto, y en él se declamará poesía de los poetas sorianos más destacados.

Más información sobre el programa abierto en esta página web.




## CONGRESO INTERNACIONAL JUVENIL EN ASIA

Todavía es posible apuntarse al 81º Congreso Internacional Juvenil (IJK) que este año tendrá lugar en Cisarua (Indonesia) del 9 al 16 de agosto. Hasta el 21 de abril se han apuntado 128 personas de 32 países, de los cuales seis de España. Será una magnífica oportunidad de disfrutar de un país muy interesante, además de un ambiente internacional único. Puedes apuntarte aquí.

La asociación juvenil internacional TEJO ha abierto además una campaña de donaciones, para apoyar la participación de jóvenes a este encuentro único. Puedes consultar cómo contribuir en este enlace.




## Y MÁS CONGRESOS INTERNACIONALES DURANTE EL VERANO

Además de los congresos mencionados, en los próximos meses están previstos muchos otros encuentros de esperanto, a nivel local, nacional o mundial.

El más importante, como es lógico, será el Congreso Universal de Esperanto, que este año

tendrá lugar en la ciudad checa de Brno entre el 26 de julio y el 2 de agosto. Puedes ver todos los detalles en este enlace.

El congreso de la Liga de Profesores Esperantistas tendrá lugar en Belgrado (Servia) entre el 19 y el 26 de julio.

La Asociación Anacionalista Mundial (SAT) tendrá su encuentro anual en Francia, en el castillo de Grésillon entre el 9 y el 16 de agosto.


En este castillo, gestionado por una sociedad esperantista se celebran durante todo el año numerosas actividades, muchas de ellas con carácter educativo, para aprender o perfeccionar los conocimientos de esperanto. Puedes ver un calendario de actividades en este enlace.



## ENTREGA DE PREMIOS DEL CONCURSO DE IDEAS PARA LA DIFUSIÓN DEL ESPERANTO

El viernes 25 de abril a las 19 horas, el salón de actos de la Fundación Cajacheste acogerá el acto de entrega de premios del II Concurso Internacional Francisco Máñez, concurso de ideas para la difusión y desarrollo del Esperanto, con el apoyo del Ayuntamiento de Cheste, la Sociedad Cultural Ateneo la Alianza, la Fundación Caja Cheste y los grupos esperantistas de Cheste y Valencia.

El Concurso ha tenido un gran éxito en la presentación de propuestas. Puedes conocer los resultados en esta web.




## LIBRO SOBRE MARUJA MALLO EN ESPERANTO

Nuestra compañera Ana Manero acaba de publicar un libro sobre la artista Maruja Mallo, con el título "Maruja Mallo, Mucho más que una artista de vanguardia", en edición bilingüe español/ esperanto

Es la tercera edición de la asociación Izquierda y Esperanto SATeH en los últimos meses, tras "Volontuloj kun okulvitroj" y "Historieroj el alia vidpunkto", que ya hemos reseñado en anteriores boletines.

El libro será presentado el día 25 de abril, a las 18 horas, en la sede de la Federación, durante "La Noche de los Libros", la iniciativa de la Comunidad de Madrid en cuya web institucional figura este evento (busca "Liceo Madrileño de Esperanto"). También será presentado y podrá ser adquirido en el congreso de Soria.

## ACTIVIDADES DURANTE LA SEMANA DEL LIBRO

El esperanto ha tenido también su protagonismo durante estas jornadas en que se conmemora el Día Internacional del Libro.

La Biblioteca Juan Régulo Pérez de la Federación Española de Esperanto ha participado de nuevo en la exposición virtual organizada por HispanaPro, el centro de recursos bibliotecarios del Minsterio de Cultura. La obra expuesta ha sido un ejemplar de "La Espero", el himno esperantista. Puedes acceder a la exposición en este enlace (la obra esperantista está en la página 78)

El día 23 dos jóvenes esperantistas participaron de nuevo en la lectura sucesiva de Don Quijote en el Círculo de Bellas Artes de Madrid. Irene y Adam leyeron el capítulo 7 completo de esa obra.

Otro año más, la Asociación Catalana de Esperanto (KEA) ha programado un amplio espectro de actividades con ocasión de la Diada de Sant Jordi, incluyendo la colocación de varios puestos en la Rambla de Barcelona y en otras ciudades catalanas, o la presentación el día 25 del lbro “Home en ruïnes: relats i poemes des dels camps de la vergonya” en el Casal Cívic i Comunitari de Sant Joan Despí.
En Fuenlabrada (Madrid) la asociación esperantista FEL ha sido invitada a participar en una actividad de difusión de la lectura en el CEIP Víctor Jara, el día 25 a partir de las 16 horas.





**NUEVOS MIEMBROS DEL COMITÉ DE UEA**

El Comité es el órgano superior de dirección de la Asociación Universal de Esperanto, cuya renovación debe efectuarse para la próxima reunión, con ocasión del Congreso Universal en Brno. La Federación Española de Esperanto, como miembro colectivo de UEA (re)elige un representante ("A-Komitatano"). Dicha función la ha desarrollado durante muchos años Ángel Arquillos, que ha solicitado ser sustituido por problemas de salud. Por esta razón, HEF ha nombrado como nuevo representante a Carlos González Spínola, de Málaga.

Además, se ha llevado a cabo un proceso para elegir los nuevos representantes de los miembros individuales de UEA ("B-Komitatano"). Entre los elegidos figura uno procedente de España, José Antonio del Barrio.

Los nuevos representantes comenzarán su mandato a partir del próximo Congreso Universal.

**BALDAŬ KOMENCIĜOS EN SORIO LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO**

Alproksimiĝas la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu en 2025 okazos de la 1-a ĝis la 4-a de majo en la urbo Sorio (regiono Kastilio kaj Leono). La aranĝo gastigos pli ol 150 esperantistojn el ĉiuj regionoj de Hispanio kaj pluraj eŭropaj landoj. Plejparto de la aktivadoj okazos en la Kultura Spaco Santa Clara, kiun la Soria Urbodomo disponigis por la evento.

Tre diversaj agadoj okazos dum la Kongreso, inkluzive de prelegoj, libroprezentadoj, videofestivalo, kaj muzikaj koncertoj, ĉio en la internacia lingvo Esperanto. Krome oni antaŭvidas la organizadon de kunvenoj kaj laborkunsidoj, kaj ankaŭ aliaj distraj kaj turismaj agadoj, inklude de turisma postkongreso la 5-an de majo.

Pliajn detalojn vi povas trovi en ĉi tiu retejo, https://kongreso.esperanto.es, kiu enhavas la programon, liston de ĉeestontoj, praktikajn datumojn, kaj aliajn informojn, kaj ankaŭ la aliĝilon.






## MALFERMA PROGRAMO DE LA ESPERANTO-KONGRESO EN SORIO

Konforme al la celoj de Hispana Esperanto-Federacio, pluraj agadoj de la Hispana Kongreso estos malfermaj al la ĝenerala publiko de Sorio, inkluzive de ekspozicio pri Esperanto, kiu estas vizitebla en la Espacio Santa Clara ekde la 21-a de aprilo; du enkondukaj prelegoj pri la lingvo la 29-an kaj 30-an de aprilo en la Círculo Amistad Numancia kaj enkonduka kurso pri Esperanto. Ankaŭ eblos senpage partopreni la muzikajn koncertojn, kun la tuluza kantisto JoMo kaj la kataluna grupo Kaj Tiel Plu.

Menciindas la okazigo de poezia vespero omaĝe al la soria poetino María Ángeles Maeso, kies verko estas parte tradukita al Esperanto. Ĝi disvolviĝos dulingve, kun deklamado de verkoj de poetoj el Sorio aŭ ligataj al tiu ĉi urbo, kiu havas grandan rilaton al literaturo.

Pliajn detalojn pri la malferma programo eblas legi en ĉi tiu retejo.




## JUNULARA KONGRESO EN AZIO

Daŭre eblas aliĝi al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu okazos en Cisarua (Indonezio) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025. Ĝis la 21-a de aprilo aliĝis 128 homoj el 32 landoj, el kiuj ses venas el Hispanio. Indonezio estas perfekta loko por pasigi vian someran ferion: atendas vin mirindaj pejzaĝoj, kultura diverseco, kaj riĉa sperto kun samideanoj tra la tuta mondo. Iĝu partoprenanto nun.

TEJO bezonas vian subtenon: donacu al la fonduso "Partoprenu IJK-n" por ebligi la amasan partoprenon de aziaj kaj oceaniaj junuloj en la unua IJK en Azio en 12 jaroj. Eĉ via eta donaco estas granda investo en la vigligo de movadoj en tiuj kontinentoj. Lernu kiel donaci.






## PLIAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ DUM LA TUTA SOMERO

Krom la menciitaj kongresoj, multaj aliaj renkontiĝoj estas antaŭvidataj por la venontaj monatoj, je loka, landa aŭ internacia skalo.

La plej grava estos la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ĉeĥa urbo Brno (aŭ Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Vi povas aliri ĉiujn detalojn en tiu ĉi ligilo.

La Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Beogrado (Serbio) inter la 19-a kaj 26-a de julio.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigos sian kongreson ĉijaran en Francio, en la kastelo Greziljono inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

Memoru ke Greziljono organizas multajn aliajn aktivaĵojn, el kiuj plurajn kun eduka karaktero, por lerni aŭ perfektigi la lingvokonon de Esperanto. Oni povas konsulti kalendaron de aktivaĵoj en tiu ĉi ligilo.




## HAVIGO DE PREMIOJ POR LA KONKURSO POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

La vendredon 25an de aprilo, je la 19 horo, la salono de la Fondaĵo Cajacheste, en la urbo Cheste (Valencilando), gastigos la disdonon de premioj de la Dua Internacia Konkurso Francisco Máñez, por la disvastigo kaj disvolvo de Esperanto, kun la apogo de la Urbestraro de la urbo Cheste, la Kultura Societo Ateneo la Alianza, la Fondaĵo Cajacheste kaj la esperantistaj grupoj de Cheste kaj Valencio.

La konkurso estis tre sukcesa, kun multaj proponoj. La gajnintojn vi povas legi en tiu ĉi ligilo.


## LIBRO PRI LA ARTISTINO MARUJA MALLO

Ana Manero ĵus publikigis libron pri la avangarda artistino Maruja Mallo, en dulingva eldono hispana/Esperanto.

Ĝi estas la tria eldono de la asocio SATeH en la lastaj monatoj, post "Volontuloj kun okulvitroj" kaj "Historieroj el alia vidpunkto", kiujn ni jam menciis en pasintaj bultenoj.

La libro estos prezentita unuafoje la 25-an de aprilo, je la 18 horo, en la sidejo de HEF, dum "La Nokto de la Libroj", la iniciato de la registaro de la Madrida regiono, en kies institucia retejo

estas inkludita tiu ĉi evento (serĉu pri "Liceo Madrileño de Esperanto"). Ĝi estos prezentita kaj oni povos ĝin akiri ankaŭ dum la kongreso en Sorio.




**AKTIVAĴOJ DUM LA SEMAJNO DE LA LIBRO**

Esperanto denove ĉefrolis dum tiuj ĉi tagoj en kiuj en la tuta mondo estas kunmemorata la Tago de la Libro.

La Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio partoprenis denove ĉijare la virtualan ekzpozicion organizitan de HispanaPro (organizaĵo de la hispana Ministrejo pri Kulturo) okaze de la Tago de la Libro. Ĉi-foje, nia biblioteko partoprenis per la verko "La espero", la himno esperantista. Historian ekzempleron eblas vidi en la paĝo 78 de la ekspozicio en tiu ĉi ligilo.

La 23-an de aprilo du junaj esperantistoj partoprenis denove en la sinsekva legado de Donkiĥoto en la madrida kulturcentro Círculo de Bellas Artes. Irene kaj Adam legis la tutan ĉapitron 7 de la verko.

Unu plian jaron Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) programis ampleksan aron da aktivaĵoj okaze de la Tago de Sankta Georgo, inklude de la pretigo de pluraj budoj en la Rambla de Barcelono kaj en aliaj katalunaj urboj, kaj la prezento de la libro “Home en ruïnes: relats i poemes des dels camps de la vergonya” (katalunlingva versio de la verko "Tagoj kaj ruinoj" de Jaume Grau Casas), la 25-an en Sant Joan Despí.

En Fuenlabrado (Madrida regiono) la loka esperantista asocio FEL estis invitita partopreni en aktivado de disvastigo de la libroj en loka lernejo, la 25-an ekde la 16 horo.





## NOVAJ KOMITATANOJ DE UEA

Okaze de la renovigo de la komitato de Universala Esperanto-Asocio, HEF, kiel landa asocio, devas (re)elekti unu A-komitatanon (reprezentanton de la landaj asocioj). Tiun funkcion faris dum multaj jaroj Ángel Arquillos, sed li ne rekandidatas pro siaj sanproblemoj. Do la estraro elektis kiel A-komitatanon por la sekvaj tri jaroj amikon Carlos González Spínola, el Malago.

Krome, okazis elekto de novaj B-Komitatanoj de UEA (reprezentantoj de la individuaj membroj). Inter la novaj elektitoj estas unu devenanta el Hispanio, José Antonio del Barrio.

La Komitato de UEA estas la plej supera gvida organo de la asocio. Novaj komitatanoj ekoficos ekde la ĉeesta kunveno dum venonta Universala Kongreso.

